

## La Rilatoj inter Teozofio kaj Budhismo

Herbert A. Welker

En 1875 estis fondita en Novjorko la Teozofia Societo. La ĉefaj fondintoj estis la rusino **Helena Petrovna Blavatsky** (kies plej grava verko estas *The Secret Doctrine* [La Sekreta Doktrino]) kaj la usona Kolonelo **Henry S. Olcott**. Ŝi estis la spirita gvidantino, li estis dum 32 jaroj – ĝis sia morto – la unua prezidanto.

Ambaŭ iĝis – en Usono, neoficiale – bhudanoj. En 1879 ili transloĝiĝis al Hindujo, kaj en majo de 1880 ili iĝis oficiale bhudanoj, farante la kvin votojn.

Ankaŭ en 1880 Olcott komencis formi la Budhanan Edukan Movadon en Cejlono (nun Srilanko). En tiu jaro estis en la lando nur 2 lernejoj administrataj de budhanoj. Pro la klopodoj de Olcott la nombro altiĝis ĝis 1907 (kiam li mortis) al 205 bazaj lernejoj kaj kvar gimnazioj. Tiel komenciĝis la granda budhana reviviĝo en Cejlono. Olcott ankaŭ defendis la budhisman kaŭzon ĉe la brita registaro, kaj sukcesis elimini kelkajn limigojn, kiujn suferis la budhanoj, kiel ekzemple la malpermeson de procesioj.

Olcott unuigis la sektojn de Cejlono en la budhisma Sekcio de la Teozofia Societo (1880); unuigis la 12 sektojn de Japanujo en Komuna Komisiono por la Antaŭenigo de Budhismo (1889); unuigis la budhanojn de Birmo, Siamo kaj Cejlono (nun Mjanmao, Tajlando kaj Srilanko) en Konvencio de Sudaj Budhanoj (1891), kaj fine unuigis la Nordan kaj la Sudan Budhismon per kuna subskribo de siaj Dek Kvar Proponoj de Budhismo (1891).

En la artikolo "*The Rise and Progress of Buddhism in Ceylon*" (La Leviĝo kaj Progreso de Budhismo en Cejlono), publikigita en 1888 en la revuo *The Ceylon Gem* de la Budhisma Societo de Publikigo de Cejlono, troviĝas la jenaj asertoj pri Budhismo kaj la Teozofia Societo:

"Post la malkovro de la vera Leĝo fare de la plej iluminiĝinta Gotama, homoj iĝis sovaĝaj kaj aĉaj pro terura volupto, kaj do perdis la sekretojn de tiu Leĝo. Sed tiuj senmortaj kaj diaj gemoj de la Vero ne estis destinitaj por tute malaperi, ĉar estis dekretite de la forirantaj Arhatoj, ke ili estu konservataj sekure kaj sankte de la Adeptoj de la trans-himalajaj profundaĵoj, ĝis la homa kondiĉo estos preta ricevi ilin. Tiu tempo nun alproksimiĝas, kaj la gardantoj de la sekreta doktrino opiniis, ke valoras la penon sendi misiistojn por malkaŝi ilin al la homaro. Unu el tiuj estas Madame Blavatsky, kiu vojaĝis al Ameriko kaj konvertis kolonelon Olcott, kiu tiam fervore serĉis la veron kaj esploris la spiritismajn fenomenojn. [...]"

En la jaro 1880, Madame Blavatsky kaj Kolonelo Olcott faris sian unuan viziton al Cejlono, kaj honeste kaj publike deklaris sin budhanoj, kaj ili establis loĝiojn de la Teozofia Societo en diversaj partoj de la insulo. Mi devas rekoni, ke per iliaj klopodoj nova impulso estis donita al Budhismo, tiel ke la multaj miloj da indiĝenoj de la insulo, kiuj ĝis tiam restis sensciaj pri Budhismo en ĝia pura formo, kaj tiuj, kiuj hontis deklari sin budhanoj publike, komencis lerni, instrui kaj praktiki Budhismon malkaŝe kaj vigle. La entuziasmega kaj brila maniero en kiu la budhanoj de Cejlono la pasintajn du jarojn festis la Wesak-tagojn sendube atestas ilia

honesta kredo je Budhismo kaj je la granda laboro farita de Madame Blavatsky kaj Kolonelo Olcott favore al Budhismo.”

Ĉar Kolonelo Olcott perceptis, ke mankis bona lernolibro pri Bhudismo, li ellaboris tian libron, nomante ĝin *Buddhist Catechism* (Bhudisma Kateĥismo). Antaŭ ol publikigi ĝin (en 1883), li petis konsilojn de la Ĉefbonzo en Cejlono, kiu korektis kelkajn informojn pri sia religio.

Aliaj **gravaj budhanoj** kaj fakuloj pri Budhismo, kiuj ankaŭ estis membroj de la **Teozofia Societo** estis:

### **Anagarika Dharmapala (1864-1933)**

Kune kun Olcott tiu sinhalano luktis multe por la revivigo de Bhudismo en Cejlono kaj en Hindujo; li laboris kiel ĝenerala sekretario de la bhudisma sekcio de la Teozofia Societo, tradukis la Budhisman Kateĥismon (de Olcott) en la sinhalan, fondis la societeton Maha Bodhi, reprezentis Bhudismon en 1893 en la Monda Parlamento de Religioj en Ĉikago kaj instruis Dharmon en Azio, Ameriko kaj Eŭropo.

### **D. T. Suzuki (1870-1966)**

Li kaj lia edzino aliĝis al la Teozofia Societo en Tokio en 1920. En 1921 ili fondis la “*Eastern Buddhist Society*” (Societo pri Orienta Budhismo) kaj la revuon *The Eastern Buddhist* (La Orienta Budhano), kiu ekzistas ĝis hodiaŭ. En 1924 ili fondis loĝion de la Teozofia Societo en Kioto. Li estis fama fakulo pri Budhismo, aparte Zen-Budhismo, publikis multajn gravajn eseojn kaj librojn pri ĝi kaj diskonigis ĝin en Okcidento. Sendube li estas la plej konata verkisto en Okcidento en la kampo de Zen-Budhismo.

### **Alexandra David-Néel (1868-1969)**

En 1890 tiu francino komencis studi aziajn lingvojn. La sekvan jaron ŝi faris al Cejlono kaj Hindujo vojaĝon, kiu daŭris unu jaron kaj duonon. En sudorienta Hindujo ŝi aliĝis al la Teozofia Societo. En 1911 ŝi vojaĝis denove al Hindujo kaj provis eniri Tibeton. Ŝi restis en Azio ĝis 1924 kaj vizitis multajn budhismajn monaĥejojn kaj renkontis la 13-an Dalai-lamaon. Ŝi ankaŭ renkontis la Panĉen-lamaon. Tiu igis ŝin lamaino kaj donis al ŝi la titolon de Doktorino pri Tibeta Budhismo. Poste ŝi diskonigis Budhismon en Okcidento, farante prelegojn kaj publikigante librojn.

### **Walter Evan-Wentz (1878-1965)**

En 1902 li aliĝis al la Teozofia Societo en Usono. Li studis multe (religion, filozofion, historion, mitologion) kaj ankaŭ vojaĝis multe (Meksiko, Eŭropo, Azio). En Azio li kontaktiĝis kun famaj hinduoj kaj budhanoj. Ekde 1919 li studis tibetajn religiajn tekstojn kaj poste tradukis – kune kun Lamao Kazi Dawa Samdup – la libron kiu estis publikigita en 1927 kun la nomo *The Tibetan Book of the Dead* (La Tibeta Libro de la Mortintoj). La sekvan jaron li publikigis la libron *Tibet's Great Yogi Milarepa* (La granda tibeta jogano

Milarepa). Li aliĝis ankaŭ al la Societo Maha Bodhi (de Anagarika Dharmapala). Li skribis plurajn tekstojn pri Teozofio kaj restis teozofiisto ĝis la fino de sia vivo.

### **Christmas Humphreys (1901-1983)**

En 1924 li fondis en Londono la Budhisan Loĝion de la Teozofia Societo. Du jarojn poste ĝi iĝis la Brita Budhista Societo. Laŭ li Teozofio kaj Budhismo estas koncepte la samo. Li eldonis diversajn revuojn pri Budhismo kaj ankaŭ *The Theosophical Review* (La Teozofia Revuo). Li publikigis multajn anglalingvajn librojn pri Budhismo, diskonigante ĝin en Okcidento.

### **Allan Watts (1915-1973)**

Je la aĝo de 16 jaroj tiu brito aliĝis en Londono al la Bhudisma Loĝio (de la Teozofia Societo) kaj tuj iĝis ĝia sekretario. Li aparte interesiĝis pri Zen-Bhudismo. Inter liaj pli ol dudek kvin libroj pri orientaj kaj okcidentaj religioj kaj filozofioj estas la konataj *The Spirit of Zen* (1936 – La Spirito de Zeno) kaj *The Way of Zen* (1957 – La Vojo de Zeno).